**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 34/1974 - 24 sep 1974
Aperas ĉiusemajne




Aĉetu la glumarkojn de la 53a Germana Esperanto-Kongreo 1974

1 Folio 1,- DM
5 Folioj 3,50 DM
10 Folioj 5,50 DM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Novaĵoj el Kopenhago

### 60a Universala Kongreso de Esperanto 1975

Kopenhago (pp) La 60a Universala Kongreso de Esperanto 1975 okazos de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975 en "Falkonercentret". Tio estas nova kaj bela kongresejo, samtempe vere praktika kaj taŭga kun grandaj kaj diversaj malpli grandaj salonoj.

"Falkonercentret" situas en Frederiksberg, kiu estas memstara komunuma enklavo preskaŭ en la centro de Kopenhago. 200 metrojn distance de la kongresejo troviĝas fervoja stacio en la reto de la elektraj S-fervojoj de Kopenhago, tiel ke oni rapide kaj malmultekoste povas veturi al diversaj partoj de la dana metropolo. La urbdomo de Frederiksberg situas 250 metrojn de la kongresejo, kaj 600 metrojn de la kongresejo troviĝas la enirejo al granda kaj ĉarma parko "Frederiksberg Have" kun la bela kaj interesa palaco "Frederiksberg Slot". Kaj tuj trans tiu parko oni trovas la zoologian ĝardenon de Kopenhago kaj alian grandan parkon "Søndermarken".

Oni povas manĝi en la kongresejo mem, sed cetere oni en la proksimeco trovas multajn, malgrandajn kaj ĉarmajn restoraciojn, kie oni povas manĝi malmultekoste. En la kongresejo mem estas hotelo, sed multaj aliaj hoteloj troviĝas proksime. Aŭtomobilojn oni povas parkumi tre proksime al la kongresejo sen malfacilaĵoj.

Jen la Loka Kongresa Komitato:

Gustav Kühlmann, prezidanto
Svend Dragstedt, 1a vicprezidanto
Ejnar Hansen, 2a vicprezidanto
Karen Hansen, Kasisto
Bodil Kühlmann, sekretario
Lizeta Kühlmann, sekretario
Jan Strönne, Malmö, membro
Victro Sadler kaj Simon Milojeviĉ, ambaŭ de la Centra Oficejo de UEA, membroj

Aliĝiloj kaj informoj estas haveblaj (por germanaj kongresanoj) ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113

*********************

## Josef F. Berger 80jara

Kolonjo (pp) Josef Ferdinand Berger, 5 Köln 1, Ehrenbergstr. 1, honora membro de Germana Esperanto-Asocio, povas festi la 80an datrevenon de sia naskiĝo la 7an de oktobro 1974. Li esperantistiĝis en la jaro 1908 kaj estis dum multaj jaroj redaktoro de Heroldo de Esperanto kaj Germana Esperanto-Revuo. Li tradukis la romanojn de Remarque "La vojo returne" kaj "En Okcidneto nenio nova" kaj germanajn poemojn kaj popolkantojn. La jubileulo verkis la legolibron "Niko kaj Nina" kaj multajn recenzojn; li estis ankaŭ aktiva en la movado, en REVELO kaj loka grupo. Pilo-Press kore gratulas!

## Adalbert Masuhr en Liberio

Monrovio. Sian 42an naskiĝtagon festos Adalbert Masuhr, Elsmhorn, malproksime de sia hejmloko la 3an de oktobro 1974. Por kelkaj tagoj li estas en Liberio kaj ĝis la 5a de oktobro en Lomé, Togo, de kie li daŭrigos sian vojaĝon!

D-ro Rudolf Kirchschläger pri Esperanto

Vieno (pp)Responde al gratuloj pro la elektiĝo al Federacia Prezidento de Aŭstrio la nuna prezidento de Aŭstrio d-ro Rudolf Kirchschläger skribis al Fritz Mosek, afergvidanta estro de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, jenon:

"Ich werde allen Anliegen der sozialistischen Esperantisten sehr offen gegenüberstehen; ich halte alles für wertvoll, was der Völkerverständigung nützt; und Esperanto tut es!"

(Traduko: Mi al ĉiuj deziroj de la socialistaj esperantistoj pozicios tre favoreme; mi konsideras valora ĉion, kio utilas al la interkompreno de la popoloj; kaj Esperanto tion faras!)

**************

Novaĵoj el Paderborn

Paderborn (pp/hb) S-ro August Weide, Hamburg, ek de la 17a de septembro estas en Paderborn. Kun sia Esperantobuso li ĉiutage staras ĉe la ĉefpoŝtejo en la ĉefstrato de Paderborn kaj kun kelkaj helpantoj disdonas informilojn. Pli ol 7000 informoj jam estas disdonitaj. La du gazetoj el Paderborn el si mem venis tien por foti la atrakciaĵon. - La unua granda sukceso de s-ro Weide: La kurso ĉe la popola altlernejo komenciĝinta la 19 sep havas 28 kursanojn.

En la gazetaro aperis duonpaĝa artikolo kun intervjuo kun Hermann Behrmann. En Paderborn nun lernas Esperanton pli ol 200 infanoj, supozeble eĉ pli ol 250. Lernejoj de Paderborn mendis ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, 175 lernolibrojn, nome Laborilo I de Sub la verda standardo.

Sabate, la 21 sep, August Weide estis en la ĉefa Esperanto-lernejo, Hauptschule Elsen, kaj instruis en la aŭlo al pli ol 100 infanoj samtempe.

Post kristnasko s-ro Weide tre supozeble iros al Le Mans, la franca ĝemela urbo de Paderborn, por ankaŭ tie venkigi Esperanton. Momente la urbestro kaj la urbdirektoro de Paderborn, rektoro Schwiete kaj d-ro Löwenberg, estas en Le Mans. La tiea UEA-delegito, lerneja inspektoro, Justin Benistant, volas kontakti la du paderbornanojn por informi ilin kaj por diri, ke ankaŭ en Le Mans estas esperantista vivo kaj la sama deziro, pli fruktedonigi la urbĝemeliĝon kaj meti ĝin en pli vastan kadron. Kun inspektoro Benistant telefone parolis Hermann Behrmann.

Merkrede, la 25 sep 74, en Paderborn fondiĝos la klubo pri Liberala Lingvopolitiko (klubo de la partio F.D.P.). Oni klopodos, ke ankaŭ CDU fondu similan klubon kaj ke ambaŭ kluboj poste fondu la "Eŭropo-Klubon". La statutoj jam estas pretaj!

Pozitivaj sekvoj de la UK en Hamburgo

Nürnberg (pp). La ampleksa informado pere de televido, radio kaj gazetaro pri la pasinta 59a Universala Kongreso de Esperanto sendube pozitive influis la sintenon de homoj, speciale de junaj, rilate al Esperanto. Dum en antaŭaj jaroj estis tre malfacile-pro nesufiĉa intereso - starigi Esperantokurson en la popola altlernejo de Nürnberg, okazis ĉi-jare agrabla surprizo. Al la kurso, kiu komenciĝis ĵus, aliĝis 16 junaj homoj kaj per tiu nombro la kurso realiĝis. Supozeble en la dua vespero aliĝos pliaj homoj. - "Do, vi vidas ke la Hamburga Kongreso estis sukceso: multaj de miaj gekonatuloj volas eklerni nian lingvon!", tiel skribis D-ro R. Sachs de Tropeninstitut Hamburg kaj li mendis 15 lernolibrojn.

Noto: Al parto de ĉi tiu numero estas aldonita invitilo al Kultura Semajnfino Esperantista en Basel

## Vortoj de Humphrey Tonkin

Münster/Romo (pp) En unu el la pasintaj Esperanto-elsendoj de Radio Romo oni povis aŭdi kelkajn ekstraktojn el parolado de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, farita dum la 30a Internacia Junulara Konferenco. D-ro Tonkin diris i.a.:

"En la lastaj jaroj - ni diru en la pasintaj 10 aŭ 20 jaroj - UEA evoluigis la principon de tiel nomata "pozitiva neŭtraleco". Mi tion povus interpreti laŭ jena maniero: UEA ne prenas politikajn poziciojn; ĝi restas neŭtrala kiam temas pri politiko, sed samtempe ĝi ja okupiĝas pri tiuj grandaj sociaj demandoj kiuj rilatas al lingvoj. Kiel vi scias estas malfacile tre ofte fari klaran disdividon inter lingvaj demandoj kaj politikaj demandoj, sed UEA restas kiel eble plej neŭtrala pri ĝeneralaj politikaj demandoj, kvankam prenante pozicion kiam temas pri la utiligo de internaciaj rimedoj por faciligi la lingvan problemon.....
Mi esperas ke ni sukcesos en tuja estonteco vere malfermi UEA al ĉiuj kiuj deziras kunlabori kun ĝi, kaj tio inkluzivas ankaŭ la junularon; mi persone faris mian esperantistan karieron, tiel nomatan, ĝuste en TEJO kaj do mi iom scias almenaŭ pri la interesoj kaj deziroj de la junularo. Kaj mi ĉiam dum tia periodo de mia aktivado en TEJO vidis ke estas multaj lokoj kie ĝuste la junularo povas fari grandan laboron en la ĝenerala movado. Mi ne estas unu el tiuj kiuj diras ke nur en la ĝenerala movado la junularo devas agadi, ĉar mi estas konvinkita, ke la junularo havas siajn apartajn interesojn, ke ĝi bezonas certan "liberecon de esprimo", kiun la ĝenerala movado ne ĉiam tiel bezonas. Tiun liberecon de esprimo oni tre zorge vartu en TEJO, sed samtempe membroj de TEJO sentu sin parto de UEA, kaj estu pretaj labori ankaŭ en tiu kadro. Do mi klopodas,kaj nia estraro klopodas, malfermi UEA al la influo de ties membroj; tio estas malfacila tasko, kiu postulas kompreneble la kunlaboron de vi ĉiuj. Kaj vi estos bonvenaj ĝuste partopreni en tiu laboro."

************

## Gratulon al 90jarulo

Recklinghausen (pp) La 90an datrevenon de sia naskiĝo festos la 1an de oktobro 1974 Wilhelm Bulla, D-435 Recklinghausen, Im Romberg 28, hejmo por maljunuloj St. Hedwig, dumviva membro de GEA kaj longjara membro de GEFA. Li eklernis Esperanton, kiam li estis jam 63jara, sed li estis regula vizitanto de naciaj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj, speciale de germanaj E-kongresoj kaj de GEFA- kaj IFEF-kongresoj. Ankoraŭ nun li vizitas regionajn kunvenojn, li korespondas kaj legas revuojn kaj librojn en Esperanto. Pilo-Press kore gratulas!

## Invitoj al aranĝoj

### Trilanda renkontiĝo en Aachen

Akeno. (pp) La 5 kaj 6 okt 1974 okazos en Aachen Trilanda Renkontiĝo laŭ invito de REVELO. Komenciĝo sabate, la 5 okt je la 10a horo.
Loko: Aachen, Maria-Theresia-Alle.
Petu informojn kaj aliĝilojn de Paul Firmenich, 519 Stolberg, Jahnstr. 5 aŭ de Norbert Merkens, 56 Wuppertal-Barmen, Gewerbeschulstr. 44, Tel. 02121-590423.

### Bavaraj esperantistoj en Bamberg

Bamberg (pp) Kiel ni jam informis, de la 11 - 13 okt 74 okazos en Bamberg, Harmoniesäle, Schillerplatz 7, en la centro de la urbo, la 18a jarkunveno de GEFA. Estas bona okazo por bavaraj esperantistoj partopreni en tiu E-aranĝo, speciale interesa estos la dimanĉa matineo, kiu komenciĝos je la 9,30 horo. Posttagmeze estos ebleco

(Daŭrigo sur p. 4)

priparoli organizajn aferojn de la Esperanto-vivo en Bavario. Nepre necesas pliviglgigi la por- kaj peresperantan agadon en Bavario. Pri tio Pilo-Press invitas ĉiujn bavarajn esperantistojn kaj esperantistojn en Bavario al speciala kunveno, dimanĉe, la 13 okt 1974, je la 14a horo en Bamberg, Harmoniesäle, Schillerplatz 7. Ŝatantoj de Esperanto-literaturo havos eblecon rigardi kaj aĉeti Esperanto-librojn.

Esperanto-kunveno en Fürth-Nürnberg

Fürth (pp) Dudeko da personoj partoprenis la kunvenon en Fürth, la dimanĉe la 22 sep 74, en kiu Ludwig Pickel prezentis impresojn pri la 59a UK en Hamburgo. Speciale impresis la parolado de d-ro Humphrey Tonkin, la nova UEA-prezidanto, dum la ferma kunsido, prezentita per radio-kaseto. Pastoro Grillenberger, Fürth, faris interesan prelegon pri la temo: Esperanto el la vidpunkto de kristana evangelio-interpretado.

Esperanto en la radio

Bedaŭrinde denove la spaco por tiu rubriko estas malgranda, kaj estus tiom multe da aferoj por priparoli kaj diskonigi. Ja vere interesaj estis preskaŭ ĉiuj elsendoj ĉi-semajnaj, ĉu de Varsovio, Berno, Vieno, Romo aŭ Pekino. Fakte necesus aparta bulteno por aprezi tiujn interesaĵojn. El la dimanĉa Esperanto-Ekspreso Varsovia ni elstarigu la intervjuon kun d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA, kiu tuŝis gravajn problemojn de UEA. Sed gravajn problemojn de la E-elsendoj traktis ankaŭ diversaj programeroj el Varsovio.: Ĉu la parolistoj parolu malrapide, ĉu en-estu facilaj tekstoj por komencantoj? Mizeran rezulton ĝis nun montris la E-redakcia konkurso, kies tekston oni disaŭdigas preskaŭ ĉiutage kaj kiun Pilo-Press ankaŭ disdonis. Ankoraŭ estas tempo ĝis la 31 okt 74! Skribu tuj!

El Popola Ĉinio
Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

La ĉina monata gazeto en Esperanto

varbas novajn abonantojn de 1975

Abonprezoj: 1-jara £ o,90 USDol. 2,20 DM 6,-
2-jara £ 1,35 USDol. 3,30 DM 9,-
3-jara £ 1,80 USDol. 4,40 DM 12,-

Abonu ĉe la loka peranto:

Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1,
Postfach 2113, PSchK Nürnberg 819 56-851

aŭ rekte ĉe La Esperanta Sekcio de
GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O.Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Bonvole abonigu ankaŭ viajn amikojn

Senpagaj specimenoj akireblaj laŭ peto